„Mutig vorwärts!“ „Kuraĝe antaŭen“

Aŭstria Esperantisto

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Internacia Esperanto-Muzeo kaj Aŭstria Esperanto-Asocio

Monata

Redaktejo kaj Administrejo: Wien, I., Neue Burg (Tel. R 27-803).

Konto bei der Postsparkasse D-123.826

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ S 3.90, germanlandanoj RM 2.75 aliilandanoj sv. fr. 3.50; ponumere: por enlandanoj 35 aŭ. g., eksterl. 45 aŭ. g.

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

10-a jaro. N-ro 2. Februaro 1933

Aus aller Welt.

Hellennische Republik.
Ministerium für Kultus und öffentlichen Unterricht
Direktion des öffentlichen Unterrichtes.

[illegible]
28.Oktober 1932

Nro. 59433

Zirkular betreffend den Unterricht der internationalen Sprache
E s p e r a n t o .

An die Herren Generalinspektoren der Schulen, Direktoren der Lehrerbildungsanstalten und der Hochschulen für mittleren Unterricht.

In Erinnerung an unser Rundschreiben No 65896 vom 7.September 1931 betreffend den Unterricht der internationalen Sprache Esperanto für die Schüler der staatlichen Gymnasien, Lehrerbildungsanstalten und der Hochschulen für mittleren Unterricht, ersuchen wir, dass Sie diesen Unterricht auf jedmögliche Art erleichtern , welchen kostenlos von d. Esperanto-Akademie der Hellenischen Republik geprüfte Esperanto-Lehrer übernommen haben. Es ist von Vorteil, dass die H. Schuldirektoren aufklärend wirken betreffs der Stellung, welche diese Sprache in der heutigen Zivilisation erreicht hat , und sein hohes Ziel, und dass sie den Schülern empfehlen, dass sie mit Liebe und Interesse den Kursen folgen mögen in ihren freien Stunden.

(Aus "Lingvo Internacia, Athen") Der Minister: P. Petridis

Esperanto in der Union der Internationalen Messen

Laut einer Veröffentlichung im "Corriere della Sera" vom 24. September 1932 äusserte sich Senator Puricelli , Präsident der Mailänder Messe und der " Union der Internationalen Messen", dass "man vorschlagen werde, Esperanto als Sprach - Code anzunehmen, da man schon mit Erfolg die Nützlichkeit dieser Konventionssprache festgestellt habe und auch , dass sie ausserordentlich nützen kann in der Korrespondenz mit Personen, w elche sie nicht sprechen, wenn dem betreffenden Esperantoschreiben ein kleiner Espe-

rantoschlüssel beigelegt wird, der jeden zur raschen und leichten Uebersetzung befähigt.
(Itala Esp.-Centro, Milano)

Das Leipziger Messeamt lädt neuerdings zu seiner Frühjahrsmesse (5.-12.3.1933) vermittels Esperanto-Werbematerial ein.

Von der Leitung der Radio-Station Lyon-La-Doua, Frankreich, wurden Neujahrskarten in französischer Sprache und Esperanto versandt. Ein Zeichen, wie hoch bei den Radio-Stationen Esperanto gewertet wird.

Spanien. Das Ministerium für öffentlichen Unterricht hat für 1933 der Spanischen Esperanto-Landes - Organisation neuerdings eine Subvention von 5000 Pesetas zugesagt.--- Mit Hilfe der pädagogischen Abteilung des berühmten Atheneums in Madrid wird die Lehrerschaft zu Esperanto-Kursen eingeladen. 60, jeder von einer anderen Schule, werden für den Kurs (Januar-Mai 1933) ausgewählt. Dieselben werden im Herbste dann an diesen -60- Schulen Esperanto unterrichten. (Hispana E-Gazeto.)

C h i n a. Der 2. E.-Kongress von Kanton fand am 25. IX.1932 statt. Dr. Kenn berichtete über den Stand der intern. E-Bewegung, A.H.Ĉan über die chinesische und H. Sinpak über die Esp.-Bewegung in Kanton, ferner Li Lok über die Cseh-Methodo.---Es folgte noch ein Ausflug nach Sepajo, wo eine Esperanto-Bibliothek und eine Esperanto-Siedlung gegründet wird. (Esperanto-Genève)

Cook's and Wagons-Lits, Weltreisedienst, Hauptbüro London, W 1 Berkeley Street, versendet seinen 8-seitigen Werbeprospekt auch in Esperanto.---Es zeigt dies, wie Esperanto immer mehr im praktischen kaufmännischen Leben Boden gewinnt.

Neue Zamenhofstrasse.
In Vic, Spanien, hat die Stadtverwaltung über Anregung unseres Pionniers J.Comella eine der neuangelegten Strassen nach dem Erdenker des Esperanto benannt.

Die Bildungsstelle des Volksbundes der Katholiken Oesterreichs, Wien, 8. Piaristengasse 43, Fernruf A 28-3-68 hat in ihrem Sommerprogramm wieder Esperanto aufgenommen. Anfänger: Dienstag 18-19.30h, Fortgeschrittene: Mittwoch 18-19.30h.--Beginn: 14.II.


"Das Kleine Volksblatt" hat 2 Esperanto - Kurse im Heime des Reichsbundes der kath.-deutschen Jugend Oesterreichs im Josefstöckl d. Augartens mit 40 Teilnehmern begonnen.
"Das Kleine Volksblatt" wird allwöchentlich eine eigene Esperantorubrik, geleitet von Reg.Rat Steiner, bringen.

o - o - o - o - o - o - o

Tutmonda Esp.-Junulara Asocio.
...*Prez.: D-ro William Perrenoud*
...Centra Oficejo: Rudolf Kutzli
Scheibenackerstr. 6, St. Gallen
Svislando.


La societo, kies prez. estis sro Csáder, Bratislava, nun havis novelekton. Ĝi celas montri al la junularo la grandecon de l'esperantista idealo.---Anstataŭ la malaperinta " Juna Samideano" ĝi nun eldonas ekde de januaro 1933 "Juna *Esperantisto*", kies redakcio estas Kraków, Jelewela 9 m.2.

Internacia Fervojista Organizo.
Hispana Ligo de Esperantistaj Fervojistoj, Madrid, Apartado 820 deziras organizi " Internacian organizon de Fervojistoj " kaj petas, ke la Esp.-fervojistoj sin anoncu al ĝi pro pluraj informoj!



Internacia Esperanto Muzeo en Wien.
Wien, I. Neue Burg, Heldenplatz
Telefono n-ro R 27-8-o3

Malfermata labortage 9-12h,15-18, sabate 9-12h kaj 5.marto 9-12h.



Dumvivaj membroj (S.15.-event. en 3 partpagoj). Por alilandanoj sv.fr.12,5o; ili enpagu la egalvaloron ĉe iu banko de sia loko por la konto de "Oesterreichi - sche Creditanstalt, Wien, I.Renngasse" kun la ordono,ke oni pagu al la Muzeo la koncernan sumon en aŭstriaj ŝilingoj.

Internacia Kuratora Komitato:

Urugvajo.

Muinos, Gerardo, Montevideo

Novaj membroj:476.Muinos,Gerardo, Montevideo,Sudameriko.

Federacioj,organizoj,grupoj k. rondoj: sama kotizo por 10 -jara membreco : 37.Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista,Praha; 38.Esperantista Klubo en Praha,Praha;39.Literatura Mondo, Budapest.

Ricevitaj sendaĵoj:
188.d-ro E.Spielmann,Bern;189. Oomoto Prop.Oficejo,Kameoka,Jap. (N."Konfliktoj en Manĉurio k.Ŝanĥajo");190.Literatura Mondo,Budapest(N:Engholm"Homoj sur tero" , Kalocsay"Kiel farigi poeto,parnasa gvidlibro");191.E.-Instit. de Estonio,Tallinn(N:Sakaria"Enkonduko en la pedagogion"); 192. Deutscher E.-Bund,Berlin;193.Helene Wolff,Kleve(N:Stef.Zweig"La okuloj de la eterna frato");194. Chas.P.Lang,Otoe,USA("Nov-Esperanto");195.T.J.Gueritte,London ; 196.d-ro Fer. Szilágyi,Budapest; 197.Kurt Schönrich,Wiesbaden;198 O.Bünemann,Hamburg;199.Int.Cseh-Instituto,Haag(La eldonaĵoj de l Instituto);200.dir.R,Kreuz,Genève (N:Koresteno"Ido-stenogr.);201 . Aŭstria Laborista Ligo Esp.,Wien (Legokajero p.komencantoj);202 . Rhein.- Westphäl.E-Verband,Köln; 2o3.E.-Societo,Beograd;204.Steiner,Bisamberg;205Intendant-generalo Louis Bastien, Paris(Bastien "Naŭlingva etimologia leksikono,1907";N.Bastien"Vocabulaire de poche Fr. - Esp.");206.Franc. Azorin,Cordoba,Hisp.;207.L.Chiba Wien;208.Muevi,Antwerpen(Ido-gazeto); 209.E.-Instituto de Estonio; 210.dir.R.Kreuz,Genève;211. Flandra E.-Instituto, Kortrijk ; 212.K.Schönrich, Wiesbaden ;213. Eldona Soc. Esperanto, Stockholm (N.Dahl"Dialogoj en E.",Seppik k Malmgren "Systematisk kurs i Esperanto);214.C.Barthel,Frankfurt 215.P.Ŝurjanenko,Valki,Ukrainio; 216.F.Epstein,Hamburg;217.Arbeiter E-Bund,Berlin(N."E.-Lehrbuch n.gramm.Lehrmethode");218.dir.R. Kreuz,Genève; 219.W.Heydorn,Hamburg;220.dro E.Pfeffer,Wien;221. Sasaki-Ken,Okajama,Jap. ("Japana lernolibro " , " Vortaro de E.kun gramatiko"ambaŭ 1.eld.1906);222. Yoshi H.Ishiguro,Tokio(N:Ishiguro "Praktika gvido de la kores - pondo en E.");223.Tagblatt-Bibl. Wien(N:Pfeffer"Wörterbuch E.-D., 5.eld");224.Delfi Dalmaŭ, Barcelona; 225.Literatura Mondo,Budapest;226.Japana Budhana Ligo E., Kioto(N:Takaisi"La Kodo de kronprinco Ŝootoku"); 227.W.Mudrak , Wien(N:Mudrak "Kunlaboro"); 228. Int. Cseh - Instituto,Haag(N:Isbrücker"Historio kaj organizo de la E.-Movado") ; 229. E.- Klubo, Brno;230.M.Leboucher,Limoges.

P.Lacowitzky,del.de UEA,Jerusalem,Palestino skribas:"Elkore mi gratulas pro la fondo de la Muzeo kaj deziras bonan sukceson.



Adreso: Trajanstrasse 25.
Oficiala invito: La ĉefurbestro de Köln, d-ro Konrad Adenauer, prezidanto de Prusa Ŝtata Konsilantaro, invitis la jubilean Kongreson.
..La Kongrespalaco de urbo Köln, situanta en bela parko apud Rhein estas je nia dispono.
..Bankkonto: Dresdner Bank, Depositenkasse, Chlodwigplatz, Köln.
..Kotizoj: Favorkotizo de Rm.18.- estas plilongigita ĝis 31.marto. Post tiu dato validos la normkotizo da Rm. 20.-.
..Grava sciigo: Dank'al la fervora subteno de sam-ano d-ro Bluth la magistrato de urbo Bad Neuenahr konsentis nomi placon meze de la urbo " Dr.Zamenhof-Platz". La solena inaŭguro okazos dum la kongreso ; la kongresanoj estas invitataj, partopreni tiun feston.
..Valoran kongresmemoraĵon ricevos tiuj, kiuj pagis sian kotizon ĝis fino de marto 1933.
..Afiŝoj pri la 25-a Universala Kongreso(3000) estas donaco de urbo Köln. Senpage haveblaj.
..Aliĝiloj (10.000 estas donaco de urbo Köln) estas mendeblaj ce Loka Kongresa Komitato.
..Aliĝis ĝis nun 325 personoj el 25 landoj.
..Fakaj kunvenoj: Anoncitaj estas:
Internacia Radio-Servo:
 Johannes Jungfer, Lindenstr.10 Lübben(Spreewald), Germanujo.
Intern.Societo de Esp. Juristoj:
 René Chapron, 32 rue desChamps Le Mans, Francujo.
Kristana E-ista Ligo Internacia:
 Paul Hübner, Pölkenstr. 4, Quedlinburg, Germanujo.
Stenografio:
 J.Berger, Heroldo de Esperanto Köln, Brüsselerstr. 94.
Studentoj:
 Klub Esperantista Akademiĉara Zagreb, Primorska 11, Ŝvenĉ - liste, Jugoslavio
Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj:
 C.W.Roome, 21 Glenalmond Road, Sheffield, Anglujo.
Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio.
Universala Asocio de Blindulorganizaĵoj:
 J.Kreitz, Herkulesstr.97, Köln.
Aliaj organizontoj bonvolu sufiĉe frue anonci siajn dezirojn.
..Fervoja rabato: Karavanoj de 15 personoj ricevos 25 % rabaton.
..Karavanoj jam anoncitaj:
 Angla
 Aŭstria
 Itala
 Nederlanda.
..Loĝigo: Loĝigon aranĝos Fremdultrafika Oficejo de urbo Köln. Mendiloj en konvena tempo dissendotaj. Bonaj ĉambroj haveblaj por 3-8 Rm.---La prezoj por tagkaj vespermanĝoj inter Rm.0.80 kaj Rm.2.--inkl.trinkmono.

Karavano al Köln.

Okaze de la jubilea kongreso de Esperanto en Köln (29.julio - 5.aŭgusto) mi aranĝas aŭtobuskaravanon de Wien al Köln.
Estas je nia dispono plej modernaj aŭtobusoj kun po 33 komfortaj sidlokoj.
Jen la vojaĝplano :
Forveturo de Wien : 26.julio matene al Linz(restado 1 horon) al Schärding(tagmanĝo;viz.)-München (rondveturo;vespere en Hofbräu ; noktigo).
27.julio: De München al Augsburg-Ulm(viz.)-Stuttgart(tagmanĝo, vizito de la urbo;noktigo).
28.julio: De Stuttgart al Karlsruhe(viz.)-Heidelberg(tagmanĝo ; v.)-Mannheim(v)-Worms(v)-Mainz(n)
29.julio: De Mainzal Bingen(v)-Koblenz(v)-Bonn(v)-Köln.
Alveno posttagmeze !
Samtage interkonatiĝkunveno de la kongresanoj !

En ĉiuj trapasotaj urboj ni havos oficialajn akceptojn,kiujn aranĝos la koncernaj E.-grupoj. Ĉie niaj samideanoj afable gvidos nin al la vidindaĵoj.

La tagmanĝojn,matenmanĝojn k. noktigejojn dum la veturado tien kaj reen mi prizorgos pere de la E.-grupoj kiel eble plej malmultekoste. Tiu aranĝo necesas, ĉar a l i e precizaj ekveturoj el la dumvojaj urboj ne estos eblaj!

La vespermanĝojn ĉiu prizorgu laŭ sia gusto kaj deziro.

La noktigejojn en Köln "Fremdenverkehrsverein" prizorgos,sed la partoprenantoj povos tion ankaŭ arangi pere de mi.

Dum la restado en Köln(29.julio-4.aŭgusto)ni veturos iutage al Aachen,por viziti ĉi tiun antikvan,vere vidindan urbon.

Reveturo :

La 4.aŭgusto: Forveturo de Köln, post la tagmanĝo,al Limburg(v) - Wiesbaden(v)-Frankfurt(noktigo aŭ en Wiesbaden aŭ en Frankfurt)

5.aŭgusto:antaŭtagmeze vizito de la urbo,tagmanĝo)-Aschaffenburg-Würzburg(v)-Nürnberg(noktigo).

6.aŭgusto:vizito de Nürnberg,la belega antikva urbo;forveturo post la 17 h al Regensburg(noktigo).

7.aŭgusto:De Regensburg-Walhalla -Passau(v)-Linz-Wien.Alveno vesp.

Ni povus ankaŭ resti en Frankfurt aŭ Nürnberg iom pli longe , entute unu tagon sen pliaj vojaĝkostoj.

La vojaĝkostoj por la veturado al Köln kaj reen kostas entute aŭstriajn ŝilingojn 85.-- (okdekkvin po persono).La prezo per rapidtrajno en t r i a klaso estas S.97.- al Köln k.88.20 por la reveturo.

Do vi havos pli belan vojaĝon vidos multe kaj ŝparos 54 % aŭ S.100.20,por kiu sumo vi jam povos kovri la elspezojn dum la 7-taga vojaĝo k.la malgrandajn elspezojn por la rondveturoj k. la enirkostojn.

La veturo de Köln al Aachen k reen kostos pksm.S.6.--(per fervojo ĝi kostus S.16.--).

En ĉiuj lokoj la samideanoj prizorgos laŭ eblo senpagajn aŭ almenaŭ tre rabatitajn enirbiletojn por la vizitadoj.

Por rondveturoj(ekz.en München) ni pagos po km 4½ gr po persono , terure malmulte(ekz.por 15 km po persono 67 gr.).

Partopreni

povas ankaŭ samideanoj , kiuj ne partoprenos la kongreson kaj iliaj konatoj!

Estas rekomendinde, ke oni sin anoncu kiel eble plej baldaŭ, por ricevi numeron sub 33 , kiom sidlokojn la aŭtobuso havas. Pli malfrue sin anoncontoj nur povos partopreni,kiam pluaj almenaŭ 29 sin anoncos,por havi duan buson.

La sumo da S.50.-- devas esti enpagata kune kun la anonco , la resto ĝis plej malfrue 1.julio!

Jam anoncis sin 10 personoj!

Montris grandan intereson samideanoj el Ĉeĥoslovakio,Hungarujo k. Jugoslavio. Certe aro aliĝos nun post ĉi tiuj informoj.

La partoprenantoj kaj ilia pakaĵo estas asekurataj.

Detaloj sekvos !

Demandojn aldonu ĉiam respondafrankon! Reg.kons.Steiner
Wien,I.Neue Burg

o - o - o - o - o

Tutmonda spartakiado 1933 .

Laŭ decido de la USSR-registaro la festo de la tutmonda proleta sporto,dediĉita al fino de l kvinjarplano,okazos 1933 en Moskva.Oni jam komencis konstrui Stalin-stadionon kun 120.000 sidlokoj.Pli ol 10 milionoj homoj ĉeestu la spartakiadon.5000 tradukantoj estos necesaj.La sovetiaj e.-istoj komencis vastan propagandon,por servigi E-on al la tutmonda sportularo laborista.En Leningrad,Moskva kaj aliaj lokoj grandaj E.-kursoj estas,mone subtenataj de sportorganizoj,en funkcio.Same oni agas en aliaj landoj. Oni celas,ke ĉiu kvina ruĝa sportulo sufiĉe bone komprenu Esp.-on.
("Internaciisto-Berlin")

Novorganizo de nia movado.

Pri novorganizo "Heroldo de Esperanto"en sia numero de 15.I. faris detalan proponon, kiu renkontis grandan intereson kaj ankaŭ konsenton de diversaj flankoj.(Legu la n-rojn 22.k.29.I.)

El "Esperanto" Genève:

La Komitato de UEA , invitita per letero de ICK de 17.nov.1932 ekzameni la projekton de Universala Federacio Esperantista

konstatante,

ke tiu Federacio konsistos senescepte el naciaj , t.e. regnaj societoj esperantistaj,

ke estas lasata en ĝi neniu loko nek por UEA kiel memstara asocio, nek por ĝiaj supernaciaj principoj,nek por giaj membroj, tiom kiom ili ne apartenas samtempe al naciaj societoj,

konsiderante,

ke la apartopreno de UEA en tiu Federacio ne estas dezirata de ĝiaj projektantoj.

ke invito akcepti ĝin estas nenio alia ol invito al memdissolviĝo de UEA

deklaras tiun projekton ne diskutebla por la Asocio .

La Komitato bedaŭras la disŝiron de la Kontrakto de Helsinki k.la voĉdonadon de certaj societoj antaŭ kiam la mortigota UEA. havis eblecon, sin oficiale esprimi pri la projekto. Ĝi protestas kontraŭ la intenco kopii ĝian jarlibron kaj ĝian sistemon de servoj internaciaj, kiujn kun multaj kostoj k.laboroj ĝi funkciigis dum baldaŭ 25 jaroj. Ĝi protestas kontraŭ la invitoj al siaj delegitoj kaj membroj forlasi ĝin favore de fondota Federacio.

Ĝi atentigas, ke tia malsolidareco k.la naciisma spirito,montrita en la federacia plano , ne povas esti la morala bazo de organizo inter samideanoj . De la ekzisto de UEA. dependos grandparte la sorto de la Esperanto - Movado.

Tial la Komitato konatigas solene, ke UEA intencas funkcii kiel antaŭe kaj resti fidela al siaj principoj.

Ĝi apelacias al la solidareco de siaj delegitoj kaj membroj,al la sento de justeco de la naciaj societoj , kaj al la prudento de ĉiuj esperantistoj.Ni nek malpacu nek arangu multoble kaj komplikation,kio jam en simpla kaj taŭga formo havas penon ekzisti.Al plivastigo de sia organiza kadro UEA estas preta.Sed tia organizo staru super la interesoj naciaj, kunigu laŭeble ĉiujn societojn k instituciojn laborantajn por nia lingvo,estu simpla,liberema, kaj respektu ĉies meritojn.

Stettler,Hon.prez.;Jakob,dir.

Univers. Federacio Esperantista (UFE.)ekfunkcias.

El "Heroldo" ni represas:

Int. Centra Komitato en Genève sendis jenan oficialan informon de 6.jan.1933:

La nova statuto de la oficiala E-organizo,submetita de la plenpova Reorganiza Komitato,elektita en la kunsido de Generala Estraro en Paris(4.8.1932)intertempe estis diskutobjekto de ĉiuj interesitaj pri la progreso de E.

Laŭ la spirito, kiu akcelis la evoluon por necesa reorganizo de ĉiuj niaj fortoj ne estas surprizige, ke la nova statuto renkontas principan aprobon ĉie, malgraŭ tio, ke modifoj kaj kompletigoj estas proponitaj kaj kritikoj eldetitaj . Pri amendoj oni decidos en la jubilea Esp.-Kongreso en Köln , ĝis kiam la nova organizo jam funkcias tute regule.

Ĝisnunaj aliĝoj al UFE.

La statuto estas akceptita de jenaj naciaj societoj kun aŭ sen amendoj:

Brita Esperanto-Asocio
Centra Dana Esperanto-Ligo

Societo Franca por la propagando de Esperanto
Hispana Esperanto-Asocio
Itala Federacio Esperantista
Kataluna Esperantista Federacio
Saar-teritoria Esperanto-Ligo
Sveda Esperanto-Federacio.

La komitato de Hungara E.- Societo akceptis la statuton kun la kondiĉo, ke la novorganizon realigu UEA en sia propra kadro.

Laŭ "Pola Esperantisto" la laborkunsido de Pollanda E.- Delegitaro en la kongreso en Lublin akceptis rezolucion de principa akcepto de unuecigo de la movado sur bazo de kunlaboro de UEA kun naciaj kaj fakaj societoj laŭ komuna kotizo. Oficiala sciigo ankoraŭ mankas.

La decidon remetis al kompetenteco de sia jar-kunveno:
Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista
Jugoslavia Esperanto-Ligo
Nederlanda Societo Esp. "LEEN"

La komitato de LEEN ĵus sciigis, ke ĝi <u>decidis rekomendi</u> al la jarkunveno la <u>akcepton</u> de l'statuto.

Aliaj societoj ankoraŭ ne respondis aŭ ne povis respondi ĝis nun. Ili estas invitataj per tio respondi kiel eble plej rapide.

La <u>statuton malakceptis ĝis nun neniu societo</u>.

La prezidanto de UEA, s-ro E. Stettler-Bern per rekomendita letero de ICK, la 14.11.1932 ricevis la cirkular-leteron de sro prez. Merchant, leteron de sro Dubois k. statuton de UFE kaj estis invitata, ekzameni la dokumentojn kune kun sia estraro k. petita sendi la respondon de UEA. pri ĝia partopreno en la novorganizo kun eventualaj proponoj, sugestoj ktp. kiel eble plej baldaŭ al prez. de ICK. Merchant. Nek la komitato, nek la membroj de UEA faris decidon ĝis nun. Oficiala respondo de UEA mankas.

<u>Mandato al Int. Centra Komitato.</u>

Brita E. -Asocio en sia kunveno de 24.11. akceptis jenan decidon:

"BEA esprimas la deziron, ke la nuna ICK plenumu la funkciigon de la nova organizo ĝis Kolonja Kongreso kaj proponas, ke la aliaj naciaj societoj esprimu saman deziron.

Saman dezir-esprimon faris, aŭ aliĝis al la propono cetere konforma al la jam antaŭa decido en Paris, la societoj akceptintaj, kiuj havis reprezentanton en la Reorganiza Komitato.

Per tio Internacia Centra Komitato, kiel ĝisnuna gvida centro de la movado, ricevis la mandaton agi de nun kiel komitato de UFE. La <u>konstitucio de UFE estas fakto</u>.

<u>Ekfunkcio de Centra Oficejo.</u>

La oficejo de ICK. estas samtempe komisiata plenumi la funkcion de Centra Oficejo de UFE k. jam ekkomencis la rilatajn laborojn. La antaŭaj laboroj estas daŭrigataj seninterrompe.

Ĉiuj sendaĵoj, destinitaj al la Federacio, estas direktotaj al:

Universala Federacio Esperant.
Centra Oficejo
Genève, 11 Rue Mont Blanc
Svislando.

Laŭ "Heroldo" 22.I.1933.

<u>Rezolucio.</u>

Britlandaj anoj de UEA, kunvenintaj ĉe Teritoria Kunveno de UEA la 7.I.1933 en London:

1. bedaŭras la manieron de disŝiro de la Kontrakto de Helsinki
2. deklaras sian fidelecon al la principo de universaleco, kiu karakterizas UEA-on
3. protestas kontraŭ klopodoj flanke de kelkaj landaj societoj por devigi la malaperon de UEA. kaj starigi novan organizaĵon bazantan nur sur landaj societoj
4. petas, ke la landaj societoj aliĝintaj al la nova organiza projekto, prokrastu la starigon de sistemo de delegitoj ĝis post la Kongreso en Kolonjo;
5. esperas, ke la gvidantoj de la landaj societoj kaj de UEA. trovos planon de unuigo, kiu permesos la partoprenon de ĉiaj ek-

ziatantaj institucioj sen rompo de kontinueco kaj sen forlaso de pruvite valoraj tradicioj.
Prezidis: Paul Blaise, Komitatano de UEA
Protokolis: Fred.A.Wadham, sekr. de UEA(Brita ter.)

Rimarko de Heroldo: Ni atentigas pri tio, ke ĉisupra rezolucio estas akceptita nur de UEA-membroj. Ni malkonsentas pri giaj punktoj 1 kaj 3; forte aprobas 5, ŝanĝante la vorton "Tradicioj" per "aranĝoj", kaj pri 4 ni konsentus nur, se UEA siaflanke sin deklarus preta, akcepti novan statuton, kiu enhavus la ĝis nun apartajn, ceterajn regularojn kaj kiu permesus la unuigon de ĉiuj faktoroj de la neŭtrala Esp.-movado en u n u societo.

Aŭstria E.-Asocio al ICK.:

Linz, 21. januaro 1933.

Aŭstria E. -Asocio en principo akceptas kaj salutas unueciĝon de la movado ; tamen, plupaŝante en la nuna vojo AEA timas skismon. La ĝusta vojo ŝajnas al ni, ke UEA. entreprenu la finkonstruon de la internacia organizo , kiel plej longjara, regule funkcianta internacia institucio.

Necese antaŭ ĉio estas kunfandiĝo de ICK kun UEA pro ŝparo kaj forigo de dualismo . Tiam povus resti la nomo UEA, al kiu dum 25 jaroj de ekzisto alkutimiĝis la esperantista publiko. Farus tre malbonan impreson, se tiom grava organizo kiel UEA malaperus eĉ nur laŭŝajne . Ne devas ekzisti devigo pri aliĝo al nacia aŭ internacia organizo ; devas resti respektata la libereco de la individuo , aliĝi laŭ propra bontrovo al nacia, internacia aŭ al ambaŭ organizoj ...Necesa tamen estas pli intima kunlaboro internaciaj societoj kaj UEA. kaj reciproka subteno diversflanka. La kotizoj estu kiel eble plej malaltaj por ebligi aliĝon al kiel eble plej multaj esperantistoj ; la membreco havigu rimarkindajn favorojn, kiuj per si mem allogas. UEA havigu al siaj membroj abonojn por rabatita prezo laŭ deziro por la gazetoj Heroldo, Lit.Mondo aŭ alia grava gazeto. UEA. ne ŝarĝu sin per eldono de propra gazeto, sed klopodu trovi interkonsenton kun la eldonejo de "Heroldo"; unufoje en la monato ambaŭ gazetoj aperu kvazaŭ unuigitaj . Ĉar krom la kutima enhavo Heroldo ankaŭ enhavu la sciiĝojn de UEA. kaj pli da literaturaĵoj ci tiu, nur monate aperanta gazeto povas esti liverata por pli malalta prezo ol la ĉiusemajna , Heroldo, kiu por multaj estas tro multekosta; Heroldo tamen daŭrigas aperi semajne. Estas multe pli dezirinde , ke ekzistas kelkaj bonaj gazetoj kun granda eldonnombro ol multaj sensignifaj.

Tio ĉi, tre estimataj, kiujn ni starigis post ricevo de sugestoj kaj opinioj el la rondoj de niaj anoj. Ni prezentas ilin por studo kaj nepre esperas, ke troviĝos la ĝusta vojo sen akraj bataloj kaj disputoj. K.Wannek, prez.

Ĝenerala kunveno de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista okazos la 19.marto. Oni pridiskutos la "Reorganizan aferon".

Ni jam de komenco defendis la deziron, ke la certe necesa novorganizo de nia movado okazu per kunfandiĝo de ĉiuj faktoroj de nia movado, kaj ni estas certaj, ke fine interkonsent kun UEA la forta , nova organizo ricevos en la Kongreso en Köln sian firman, ne plu skueblan fundamenton!

Ni esperu kaj kunhelpu ! St.

o - o - o - o - o - o - o - o - o

Pri novaranĝo de AE.:

"Mi prenas la okazon por gratuli vin pro la felica solvo de AE. Speciale plaĉas al mi, ke malgraŭ la pli malgranda kosto la enhavo ampleksiĝis."

J.Wiesböck, instr. Schattendorf.

V a r b u a b o n a n t o j n !

K u n h e l p u !

Wien havos mondekspozicion! "Wipa 1933"

De Ludwig Hesshaimer,
prezidanto de "Unio de Aŭstriaj Filateli-Unuiĝoj" kaj 1.prez. de la ekspoziciokomitato "Wipa 1933".

El nia mizero kreskas granda agado de germanaj energio kaj organiztalento. Malgraŭ ciuj ekonomiaj malhelpaĵoj, ciuj diversmanieraj impost-,spirit- kaj korbariloj,kiuj estas starigataj kun senkompata agemo ĉirkaŭ nia bela Germanaŭstrio. Malgraŭ la malgrandanimeco,per kiu la mondo malrekonas(1) la fakton, ke la kultura graveco de nia popolo estis kaj estas kundecidiga (2) pri la kulturnivelo de la tuta homaro,ce ni en Wien,kiu suferas pro la krizo,renove io granda kaj por la tutmondo grava estas kreata.----la mondekspozicio"Wipa".

Depost 2 jaroj oni laboras por ĝi , tute senbrue kaj kun abeldiligenteco.-Estiĝu la plej granda filatelia ekspozicio,kiu iam estis aranĝita kaj oni havos la okazon admiri de 24.de junio ĝis 9.de julio 1933 en Künstlerhaus , Secession kaj Militärkasino en Wien la plej maloftajn , valorajn , interesajn kaj belajn poŝtmarkojn el la tuta mondo. Ĉi tiuj tri konstruaĵoj, niaj plej bonaj kaj belaj ekspoziciejoj(3) , ni luprenis por "Wipa".Federacia prezidanto Wilhelm Miklas akceptis la protekton kaj ĝeneralpoŝtdirektoro Viktor Aigner la honorprezidon.

Kune kun mi laboras komitato de 30 honoroficaj sinjoroj, la plej gravaj filateliaj fakuloj de Aŭstrio , inter ili kiel plej grava,la estro de la tutorganizaĵo, inĝeniero Edwin Müller.

Tiu ĉi komitato laboras nome kaj laŭ komisio de "Verband österr. Philatelistenvereine" , kiu konsente kun la granda germana Ligo kaj la ĉeforganizo "Fédération Internationale de Philatélie" prenis sur sin la aranĝon de ĉi tiu mondekspozicio,por servi unuvice al la filatelio, ĉi tiu bela kaj nobla kolektfako, aliavice al nia bela Aŭstrio. Pro ĝia arta kaj morala graveco(4)"Wipa"logos al Wien aregon (5) da alilandanoj , kies per valutoj plenigitaj monujoj estos tre bonvenaj al nia modesta ŝilingo . Kaj, ke la interesuloj venos en grandaj amasoj , tio estas la merito de nia organizmaniero kaj propagando,kiuj estas farataj de ni celkonscie, nelacigeble(6)kaj malegoisme(7)depost du jaroj . Giganta korespondado enkondukis la propagandon , preskaŭ ĉiuj registaroj kaj ĝeneralpoŝtdirekcioj de la tuta mondo estas kun ni en kontakto kaj konsentis sian partoprenon. La plej grandaj kolektantoj de la terglobo estis interesigataj al Wipa kaj pli ol 500 apartenas al ili al la honorkomitato. Al la honora prezidantaro apartenas nia tuta federacia ministraro kaj la rajtigitaj ministroj,ambasadoroj kaj konsuloj de preskaŭ ĉiuj ŝtatoj de la mondo. Ĉar ni krome starigis (8) en 200 de la plej grandaj urboj de la mondo reprezentantejojn kaj niaj belegaj , malmultegekostajn varbmarkojn disvastigis (9) en 1 ½ milionoj da ekzempleroj trans la tutmondo , ankaŭ la plej izolaj kolektantoj sciiĝos(10)pri nia WIPA.La varbmarkoj, en belega kupropreso de la artejo(11)Rosenbaum kaj nia Ŝtatpresejo , estas laŭ skizoj de mi mem , parte estis gravurataj de gravuristo Adolf Schuricht kaj estas haveblaj en nia oficejo Wien,I.Wallnerstrasse 6, krome en ĉiu tabakvendejo en Wien. En la 5 belaj ejoj de nia ofic-,varb-kaj propagand-ejo,kiu gastigas (12) depost du jaroj nian sekretariejon kaj estas nia filatelia centro en Wien,ĉiu estas kore akceptata kaj ricevas ĉiujn informojn. La rondo de la interesuloj ĉiam pligrandiĝas(13),ĉar partoprenos ne nur kolektantoj kun siaj admirindaj valoraĵoj(14) el Aŭstralio,Ĉin-

ujo,Japanujo,Ameriko ktp.,sed ankaŭ la plej grandaj poŝtmarkfirmoj ekspozos. En Militärkasino,kiun ni instalos kiel kongresejon,la borso havos sian kunvenejon kaj okazos filateliaj kongresoj ciuspecaj, el kiuj jam dekduo,inter ili"Deutscher Bundes-u.Philatelistentag", estas anoncitaj. Per tio ĉio,kio iel estas en kontakto kun fremdulfrekvento,estas interesigata en Wien je WIPA,ĉar oni ne nur devas bone gastigi ĉiujn venintojn,sed oni ankaŭ devas zorgi,ke ili ne nur vidu poŝtmarkojn,sed ankaŭ la belecojn de nia hejmlando,la belaĵojn de nia urbo ,ĝiajn teatrojn,la ĉirkaŭaĵon ĝis la altaĵojn de Rax k. Schneeberg. Ĉien oni ilin kondukos !

Kiel plej alta premio estos "Ora portretmedalo",dediĉita de la Federacia Prezidanto,belegaj ormedaloj kaj honorpremioj de la registaro,de la poŝtdirekcio kaj de urbo Wien ktp.Ĉiuj ekspozantoj ricevos belajn,arteće faritajn memormedalojn.

En niaj varbiloj,kiujn ni jam eldonis en belega ekipo kaj kiujn sekvos ankoraŭ tri kajeroj kaj aro da aliaj presaĵoj,katalogoj kaj la oficiala festlibreto,ni uzis la tri mondlingvojn.§)

Wien jam delonge estas filatelia centro kaj havas en tiu kampo grandan tradicion. 1911 estis en Secession internacia ekspozicio , 1923 estis internacia, 1926 ekspozicio por filatelio, 1928 la granda "Deutscher Bundes- und Philatelistentag"(Germana Ligo-kaj filatelio-kongreso)kaj pluraj internaciaj kongresoj.

Havante la subtenon de ĉiuj oficialaj administraroj kaj la simpation de ĉiuj,kiuj ĝis nun aŭdis pri WIPA,ni povas kalkuli certe je plena sukceso.

Klarigoj:1)mal-rekon-as verkennt;2)kun-decid-ig-a mitbestimmend; 3)ekspozici-ej-oj Ausstellungsgebäuden;4)grav-ec-o Wichtigkeit; 5) ar-eg-on Masse; 6)ne-lac-ig-ebl-e unermüdlich; 7)mal-egoism-e uneigennützig; 8)star-ig-is errichteten; 9)dis-vast-ig-is verbreiteten; 10)sci-ig-os werden erfahren; 11)art-ej-o Kunststätte; 12)gast-ig-as beherbergt, zu Gaste hat; 13)pli-grand-iĝ-as vergrössert sich; 14)valor-aj-oj Wertstücke.

---

§) Bedaŭre oni ne uzis Esperanton krom la tri lingvoj angla , franca kaj germana, sed parte tio estas nia kulpo,ĉar ni ne ĝustatempe faris niajn koncernajn proponojn.....Sed WIPA kaj ĝia prezidanto kolonelleŭtenanto Hesshaimer,la konata grafikisto,kaj ĝeneral-afergvidanto inĝ. Müller konsentis,ke Internacia Esperanto-Muzeo en granda kadro ekspozu la korespondaĵojn en Esperanto kun tutmondo. Steiner.

Profesoro d-ro Odo Bujwid,

membro de Int.Honora Komitato de Internacia Esperanto-Muzeo

ricevis de la Prezidanto de Pola Respubliko la altan distingon de "Komandora Kruco de ordeno de la Renaskiĝo de Polujo" Elkoran gratulon. IEMW.

"La lasta valso"

Erare estis forlasita en la lasta numero la nomo de la tradukinto , s-ano R. Ulbrich. Ni petas pardonon !

Gravaj informoj.

En"Der Wiener Tag"sub la rubriko"La leganto havas la vorton" aperis kelkaj artikoloj kontraŭ Esperanto(Ortony)k.por(Kaff).

Broŝuro pri Estonio.

Estona Centra Organizo por Turismo ĉe Ministerio de Trafiko decidis eldoni broŝuron pri Estonio en Esp.-Mendu ĉe Eesti Turistide Uhing,Tallinn,Estonio.

"Esperantista Grupo ĉe Szul-Kult"(juda grupo)en Wilno,arangis la 3.febr. "Literatura Muzika Vespero"-n kun granda programo , dum kiu la membro de IEMW. s-ano S.Szyk salutis nome de IEMW.--La programo estas presita en Esperanto kaj per judaj literoj.

E.- grupoj "Espero" kaj "Merkurio " en Rotterdam dissendis cirkuleron kontraŭ la propono akceptita en Paris,pri la novorganizo de la E.-movado.

Ŝlosilo de Esperanto por Araba lingvo. Eld.Fahim Harfouche,Port Said,Egiptujo.75 paĝoj,1932.

Hoteloj"Bonnington"London WC.I Southampton Row kaj apud Russel Square, kaj"Little Bonnington ", London WC 1, Bloomsbury Square , dissendas Esp.-varbilojn.

Esperanto-Klub , Wien.

La unua amika kunveno estis la 26.II.,dum kiu klubano Walter Smital prelegis "La literatura krizo kaj ---ni".

La 9.februaro okazis parolado de Kammerkonsulent Alexander Max Vallas pri " Neuheitenevidenz der Wiener Handelskammer"kaj "Bona k malbona reklamo". La enkondukajn vortojn en Esp. kaj germane parolis s-ano Rudolf Foltanek.

La aŭskultantaro kun granda intereso sekvis la paroladon,kiun la parolanto en sia konata humora maniero sciis formi ege interesa.

La 23. februaro okazos la dua amika kunveno, dum kiu parolos fino Basler,s-anoj Kraus kaj registara kons. Stengel. (La temoj ne estas konataj). La vizito por la membroj ne estas deviga , sed ni petas multnombran partoprenon kaj kunvenigon de gastoj.

La 9. marto:

Lumbildparolado

de Baurat Ing.Siegfried Theiss , prof. en Teknika Altlernejo, pri

"Das Hochhaus in Wien"

en germana lingvo. Prof. Theiss estas la kreinto de la planoj de la unua turdomego en Wien,Herrengasse.----La enkondukajn vortojn en Esperanto kaj germane parolos ing. arkitekto Hugo Steiner.

Ni petas, ke la klubanoj estu ĉiuj ĉe la parolado kaj invitu s-anojn kaj interesulojn.Ni sendos al la anoj po 5 invitkartoj, kiujn ili certe disdonu.

S-anoj,kiuj deziras partopreni,petu enirkartojn de la Muzeo.

Konsiderante la eminentan parolonton ni petas fruan alvenon.

La parolado okazos en la klubejo "Goldener Saal" de kafejo Siller,Wien,I.Schwedenplatz, kaj komenciĝos precize je la 20-a h.

Eniro s e n p a g a !

Plenplena salonego faros bonan impreson ĉe la eminenta publiko!

Adelheid Bergmann,

die unseren Klub-Unterhaltungsabend durch ihre schönen Lieder zur Laute, darunter eines in Esp. verschönte, gibt am 5. März, 17 Uhr im Klubsaale der Urania einen Liederabend.--Kommet zahlreich!

o - o - o - o - o - o - o - o-o

Enigmo!

De Günter Erber, Graz.

.... mangâjo
..... gaso
...... kion vi havas antaŭ vi
.... komenco de opero
.... malo de mensogo
.... regulara pago al la ŝta-
..... arbo to
... sufikso kun finaĵo
...... libro por fotografaĵoj.

al - al - az - bu - er - ga - im
mo - ne - nj - no - o - o - o -o
ot - pa - po - ro - ro - st - to
tu - uv - ve - ze.

El la nomitaj litergrupoj oni formu vortojn laŭ la ĉi - supra skemo . La unua vertikala vico , legota de supre malsupren, kaj la tria , legota inverse , enhavas gravan sciigon al multaj el la estimataj legantoj.

- o - o - o - o - o - o - o - o

Ŝercangulo.

...Malamikoj de la Esperanto-lingvo diras , la esperantistoj estas frenezuloj.
...Malamikoj de la Esperanto - lingvo , diras la esperantistoj, estas frenezuloj.
...Feinde der Esperantosprache sagen , die Esperantisten sind Verrückte.
...Feinde der Esperantosprache , sagen die Esperantisten , sind Verrückte. (Pernegg-Graz)

...Servistino(en la nokto): "El-litiĝu, ŝtelisto estas en la domo"!
...Mastro(restante en la lito) : "Diru al li, ke mi ne estas hejme"!
("Germana Esperantisto")

Werbet für unser Blatt!

Por la infanoj .

En la gvidlibron de mia infano.

La okuloj tiel bluaj kiel la ĉejano nun
La malgranda koro pura kiel la lili' en sun'.
Mia kara infaneto!
Se rigardas la okuloj min profunde ĝis la kor'
Ree la anim' esperas kaj la zorgoj flugas for.
Mia dolĉa infaneto!
Gardu vin la bona Dio, estu pura ĝis la fin',
Estu bona kaj humila, la Sinjoro benu vin.
Amu vi la proksimulon kaj penadu ankaŭ vi
Kunlabori por la venko de ĉiama harmoni'.
Ĝoje lernu Esperanton, ĝi kondukas al la cel'.
La mallumaj tagoj falos, vi ĝuados en la hel'.
Infaneto mia ! Dr.Fl.

Deziras korespondi.

...Roma, Italujo: D-ro Mario Cocilovo, Via Taro 25. Inters.pm.
...Stalingrad, USSR: Sino R.Gunina Elabujska n 23; il.pk.
...Hvammstanga, Islando: Joh.Torsteinsson; il.pk.
...Linköping, Svedujo: F-ino Greta Haknsson, Vasa Foto, Vasagatan 13.

Aŭstria E.-Asocio
Linz, Weissenwolfstrasse 31.

Prüfungen

für das Lehramt und den Nachweis der Kenntnis des Esperanto.

Diese beginnen am 3. April um 8 Uhr früh mit der schriftlichen Prüfung im Gebäude der Bundeslehrerinnenbildungsanstalt, Wien, I. Hegelgasse 14.--Die gestempelten Gesuche sind bis 18. März bei der Direktion der Prüfungskommission

Wien,I.Burgring 9(Stadtschulrat) Zimmer 53 einzubringen. Die Prüfungsgebühr von S.20.-bezw.10.-- ist vor Beginn der schriftlichen Prüfung im Prüfungsraume zu erlegen.

Gazetara statistiko. Laŭ nia statistiko nekompleta 170 notoj pri Esp. aperis dum 1932 en 32 aŭstriaj gazetoj. Ne enkalkulataj estas la mencioj de la Esperlingvaj Radio - dissendoj en la aŭstriaj Radio-ĵurnaloj. La plej multaj notoj aperis en Linz, Braunau,Krems,Leoben,Ried,Steyr. Serĉataj helpantoj por la gazetservo en Wien kaj aliaj lokoj.

...Krems.En la ĉefkunveno,la 19. jan. estis elektataj: prez. Franz Stanke;vicprez.Emma Prokopp;sekr. Josefine Protiwinsky,Josefine Decker;kas.Maria Krautzberger k. 5 konsilantoj.-La 24.,25.k. 26. jan. en Stadt-Kino antaŭ la regulaj prezentadoj la propaganda filmo " Köln am Rhein",die Stadt des XXV.Allgemeinen Esperanto - Kongresses im Jahre 1933".

...Linz. Migristo Gittinger el Linz rakontis aventurojn kaj montris lumbildojn el la nordaj landoj kaj polusa regiono en la E.-grupo la 13.de januaro.

...Lend. Depost oktobro funkcias daŭriga kurso kun 13 partopr.

...Wien.E.-Soc.Danubio.20.II.dir. Rud.Kaftan: La horlogmuzeo;kort. kons. d-ro K. Klečka: Estis foje episkopo; s-ino Irma Ultmann: Moderna fabelo;27.II.:Parolata E.-gazeto : Ĉech(aktualaĵoj),Werner (gramatika temo),Thea Kohn (Humoraĵoj), Klein(sporto), Hovorka (poemoj) , d-ro Pfeffer (Mariĉka Magdalova).---La 30.I.estis ĝeneralkunveno.Raporto ne venis.

...Je adiaŭo al fervora s-anino Mantel Minuska, kiu transloĝiĝis al Lwów,Wien-aj ges-anoj kunvenis la 3. de febr. en la klubejo de D-ro Sós-grupo.

Varbu por nia gazeto!
Sendu raportojn!
Kunlaboru!

Esperanto-Verein f.Steiermark
Graz,Schönaugasse 6

Leitungssitzung v.27.I.:Durch Vereinbarung mit dem Ĉefdelegito der UEA. v.22.I. wurden die Beitragssätze f. unsere Vereinsmitglieder auf S.2(HM)S.4(M)S11(MA) ermässigt . Den AE. erhalten nur jene Mitglieder , die den Betrag von S3 auf den Mitgliedsbeitrag v.S.5 aufzahlen,d.Rest bezahlt d. Verein.Die Informaj Raportoj werden vorläufig etwa 5mal jährlich kostenlos geliefert . Von diesen Aenderungen und der Möglichkeit der Ratenzahlung wurden die Mitglieder(einschl.18 kürzlich ausgetretener) durch Rundschreiben verständigt. Dr.Biehler.

- o - o - o - o - o - o - o -

Rimarkindaj presaĵoj.

The Esperanto Publishing Co.Ltd. London.

" Kompatinda Klem ",originale verkita de John Merchant.-90 pg. Ĉu vi vizitis Universalan Kongreson en Helsingforso ? Tiam certe vi renkontis"kompatindan Klém ", la heroon de nia ĉarma rakonto. Mi ne riskas diri,ĉu la verkisto,la ŝatata prezidanto de la Internacia Centra Komitato,aludas ian certan personon, aŭ ĉu Klem estas infano de lia fantazio. Ni kontentiĝas pri tio , ke s-ro Klem nin interesas de la momento de sia naskiĝo ĝis la kiso al tra aero flirtanta rozo , kiu faro estis kvazaŭ lia fianĉiĝo . Vera esperantisto li estas de komenco,eĉ antaŭ la komenco de lia surtera vivo,ĉar li devis multe batali kontraŭ fatalaj aferoj , ekzemple estis lia unua fatalo, ke li fariĝis viro anstataŭ virino , la sorto ŝanĝiĝis, li havis feliĉon,konatiĝis kun Esperanto kaj faris sian unuan grandan vojaĝon al Finlando al la XXIV-a Univ.Esperanto Kongreso en 1922 . Ĉar li estas skoto,li faris la vojaĝon kun la

Brita E-Asocio per la ŝipo "Arcturus" forveturinte de Hull. Ha, *kiel agrable estas oportune sidanta en apogseĝo nun legi pri marmalsano de surŝipa esperantistaro.* Specile s-ro Merchant, suferis tian senkompateman malsanon, ke li forgesis sian prezidantecan indon (prezidanto de Brita Asocio kaj karavanestro)k. babiladis kun Klem --- ambaŭ jam estis bone kaj kore enamikiĝintaj---kiel senhelpa infano. Ĉar, sciu, kara leganto, la verkisto Merchant devis laŭ la cirkonstancoj de nia rakonto enkonduki la esperantiston Merchant kiel agantan personon.

Ni sekvas la ŝipkaravanon ĝis Helsinki, travivas la kongreson, ne precize la oficialaĵojn, sed la detalajn travivaĵojn kaj la intimajn farojn eĉ de konataj esperantistoj, inter kiuj nun miksita la "kompatinda Klem", kiu jam de longe ne plu estas kompatinda sed enviinda. Post la kongreso sekvas antaŭ la hejmiro malgranda devojaĝo al Norda Lando, dume la sorto de nia heroo Klem fariĝas kompleta.

La verkisto estas "granda" en priskribo de plej malgrandaj bagatelaĵoj, el kiuj tamen konsistas la tuta homa vivo. Kiamaniere virino kondutas en hotelo, kiamaniere viro ligas la kravaton, la aferetojn ĉe giĉetoj oni legas kun tia plezuro, kian oni nur povas havi eksciante, ke ankaŭ aliaj homoj ofte eraretas, faletas ....ne nur ni mem. Lud.Si.

...Wollen Sie bitte Ihren rückständigen Bezugspreis für per S . möglichst umgehend einzahlen. Wir benötigen das Geld, denn auch wir müssen zahlen. Dank !

K a r a v a n o K ö l n.

Partoprenontoj povos komenci la vojaĝon ankaŭ dumvoje ekz. en St.Pölten, Linz ktp.

Kunvenoj de esperantistoj.
Zusammenkünfte der Esperantisten

...Baden.N.Pronay, Bahngasse 2.
...Braunau am Inn.
I.O.Haselbauer, Haselbach.
...Graz.
E.-Verein f.Steiermark, Schönaug. 6/II; Vereinsheim(kunv)Bürgerg.4. Freit.(v)20-23 h.
E.-Verein"Em.Peltier" Reitschulgasse 8/III; sekr.Alois Koudelka.
...Hainburg.Volksschule, Di(m)20h
...Hallein.Gasthaus Freischütz.
...Innsbruck.Hotel Grüner Baum, Museumstr.35; Do(j)20h.
...Klagenfurt.Elektrizitätswerke
...Krems.Realsch.Ringstr.Do(j)20h
...Linz.Gasthaus Stadtgut, Volksgartenstrasse.
...Salzburg.
...E.-Gruppe: Gasthof Schwarzes Rössel, Bergg.; Mi(mk)20 h
...E.-Gruppe"Estonteco" prez.Kaps Dreifaltigkeitsgasse 14.
...Sigmundsherberg.Schule, Fr.20h
...Steyr.Schlüsselhofg.24(v), 20h
...Wien.
...D-ro Sós-grupo, I.Kafejo Kolowratring; Schubertring 2; Fr(v)19h
...E.-soc.Danubio, Cafe Egkher, 7. Lerchenfelderstr.23; M(l)20h
...Akademia E.-Unuiĝo, la sama ejo kaj tago
...Merkreda Rondo, 4.Schäfferg.3 Magistrat.Bez.Amt, Mi(mk)19 h
...E.-Soc.Fideleco, Cafe Zoglmann 18.Staudg.1, Di(M) 16-19 h
...Koloman Kalocsay-grupo, ĉe sro Hovorka, 9.Löblichg.3; Mi(mk)19h
...Libera E-Rondo"Verda Angulo" Cafe Hrdy, 16.Ottakringerstr.119, Mi(mk)20-22 h
...E.-rondo Kolonelo Zwach, ĉe Sta[illegible] 7.Mariahilferstr.120; Di(m)16-18h
...Grupo en Meidling, Cafe Theresienbad, 12.Schönbrunnerstr.271, j
...E.-org.de Oficĥavantoj (kiel Merkr.Klubo) ciutaĝe esc.sab.; 19h
...Katolika Unuiĝo E., I.Freyung 6(Schottenkloster), Mi(mk)18-20h

Esperanto-librovendejo Foltanek Wien I.Herrengasse 2.

Posedanto, administranto, eldonanto k.respondeca redaktoro Regierungsrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstrasse 154.
Preso ĉe Rudolf Foltanek, Wien, I.Herrengasse 2.